


L a GO en la 63a KANSAJa Esperanto Kongreso (KEK)



MORI Hitoŝi
KANSAJo estas la okcidenta regiono de la insulo Honŝuu de Japanujo. Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG) okazigis la kongreson, KEK-n, dum du tagoj en junio, kie aliĝis ĉirkaŭ 200 esperantistoj. Ĉi-jare, ĉefe membroj de

Kioto-Esperanto-Societo zorgis pri la kongreso, lokita en la Domo por Internacia Komunumo de Kioto. Mi, kiel sekretario de Japana Esperantista Go-Asocio, zorgis pri la fakkunsido de JEGA, okazigita dum 90 minutoj en antaŭtagmezo de la dua tago, la 21a de junio.

Aliĝis 4 membroj de JAGA, kaj 3 ne-membroj. Lertaj membroj instruis ne-lertulojn ludante ekzercajn ludojn sur malgrandaj 9x9-tabuloj. La 3 ne-membroj ricevis la enkondukantan libron, “Invito al GO-ludo”, kaj malgrandan ludilon, t.e. paperna tabulon, nigrajn kaj blankajn ŝtonojn.

MORI Hitoshi mori_kin@nifty.com

Rusio

Go-ludo en la suda Uralo



Komence de majo en Rusio estas kelkaj feri-tagoj kaj mi uzis ilin por vojaĝi al la urbo Ĉelabinsk (suda Uralo). Tie mi partoprenis tradician festivalon de uralaj kaj siberiaj esperantistoj "EsPrimo". Tio estas sufiĉe granda ĉiujara evento, kun 50-60 partoprenantoj, venas homoj el la tuta lando.



Mi estis kun-organizanto kaj okupigis homojn pri diversaj intelektaj ludoj. Interalie mi aranĝis metiejon pri go-ludo, tio jam estis la 2-a fojo, kiam mi instruas rusajn esperantistojn ludi goon, ili ĝuis kaj interesiĝis pri

la ludo. Mi sendas fotojn al vi.

Antaŭ la vojaĝo mi subite eksciis, ke en la sama urbo en la sama tempo okazas granda go-turniro - ĉampionato de la Urala federacia distrikto. Do mi decidis partopreni ankaŭ ĝin. Tie mi gajnis 3 partiojn kaj malgajnis 2. Interalie mi denove ludis kontraŭ tiu 7-jara knabo, pri kiu mi skribis al vi antaŭe. Li kreskas ege rapide kaj nun jam estas 7 kju. Lia patro diris, ke reale li ludas eĉ pli forte (eble je 5 kju). Kompreneble li ree venkis min en la turniro. Eble li iam iĝos profesiulo, mi kredas tion. Lia nomo estas Artemij Piŝĉalnikov. Krom tio mi konatiĝis dum la turniro kun Yang Tong-Yuan, ĉino, kiu nun loĝas kaj studas en Rusio. Li estas tre forta ludanto (4 dan) kaj tre bonkora homo. Li iom instruis nin pri ĵouseki inter la turniraj partioj.

Roman Efremov